In explorative instructional research an investigation frequently starts with a test. By the aid of chiefly quantitative methods one likes to get understanding of the global structure of the instructional subject in the view of pupils. Unfortenately rough dates of such a test are inhomogenious. Rough dates and therefore target variables depend on the pupil's »achievement level« and the item's »degree of difficulty«. The problem is, how to handle the »moderator variables« achievement level and degree of difficulty. Pupil's achievement level should be considered by selecting partial groups of approximate constant level, using author's statistical procedure. Item's degree of difficulty should be considered by splitting items into partial groups of equal attributes. The computation of values of target variables is recommended to carry out first on the level of partial groups. The combination of values from different partial groups results from forming an »index«, using the linear function. The coefficients of this one stands for the »weights«. By means of several examples of common interest the author shows, how to determine weights.

Oficialaj Sciigoj de AIS - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino

Prezidanta Sekretariejo: KleinenbergerWeg 16B, D-4790 Paderborn, Tel. (0049-/0-)5251-64200 ☎
Subtena Sektoro: p.a. ADoc.Dr.L.Weeser-Krell univ.prof., HerbramerWeg 9, D-4790 Paderborn

Finredaktita: 1989-06-17/1688pfR *Redakcia respondeco: OProf.Dr.Helmar FRANK*

SESA SANMARINA UNIVERSITATA SESIO

(SUS 6)
1989-08-26/09-04
(1688/89 pfR)

de la

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ (AIS) SAN MARINO

*

Programo

Stato: 1989-06-03

Sesta Sessione Universitaria Sanmarinese (SUS 6) dell'Accademia Internazionale delle Scienze (AIS) San Marino.

Sechste Sanmarinesische Universitäre Studientagung (SUS 6) der Internationalen Akademie der Wissenschaften (AIS) San Marino.

Sixth Sanmarinian University Session (SUS 6) of the International Academy of Sciences (AIS) San Marino.

Sixième Séance Universitaire Sanmarinienne (SUS 6) de l'Académie Internationale des Sciences (AIS) San Marino.

La laborlingvoj de SUS 6 estos

Le lingue di lavoro di SUS 6 sono
Die Arbeitssprachen von SUS 6 sind
The working languages of SUS 6 will be
Les langues de travail de SUS 6 seront

la Internacia Lingvo (ILo)

e le lingue ethniche ufficiali dell'AIS
und die ethnischen offiziellen Sprachen der AIS
and the ethnic official languages of AIS
et les langues ethniques officielles de l'AIS

Italiano * Deutsch * English * Français

Programo por la 6-a Sanmarina Universitata Sesio (SUS 6)

de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino

Stato: 1989-06-03/1688 pfR

1. Malfermo, fermo kaj oficialaj kunsidoj

12-a Senatkunsido: Sabaton 89-08-26, 17-19 h, dimanĉon, 89-08-27, 11-13 h, kaj lundon 89-09-04, 9-11 h, en la muzikinstituto (nepublika).

Kunsido de membroj de la ekzamenoficejo, dimanĉon, 89-08-27, 11-13 h, en la muzikinstituto.

6-a Asembleo de la Subtena Sektoro: dimanĉon, 89-08-27, 17-19 h, en la muzikinstituto.

Malfermo de SUS 6 (kun envestigoj kaj transdono de dokumentoj): dimanĉon, 89-08-27, 21-22:30 h, en la muzikinstituto. Cele la inaŭguron de la Teknika Sektoro de AIS prelegos doktoro L.C. Zaleski-Zamenhof pri „Betonaj Konstruaĵoj en la Maroj. Progresemaj Inĝenieraj Teknikoj". Inaŭguro de la Arta Sektoro en la ekspoziciejo fare de vicprezidanto OProf. F. PENNACCHIETTI, lundon, 89-08-28, 20.30 h.

Sekcikunsidoj: mardon, 89-08-29, 21.00-22.30 h kaj sabaton, 89-09-02, 15-17 h (temoj . . .), en la muzikinstituto.

Forumo pri Akademiaj Rekomendoj. Temo: Nova komunikada moralo. Merkredon, 21.00-22.30 h en la muzikinstituto.

Fermo de SUS 6 (kun envestigoj kaj transdono de dokumentoj): dimanĉon, 89-09-03, 15-17 h, en muzikinstituto.

8-a Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS: dimanĉon, 89-09-03, 17-19 h, en la muzikinstituto.

2. Sciencaj kursoj kaj prelegserioj (po 8 studhoroj plus libervola finekzameneto por enskribiĝintoj)

Sekcio 1: Kibernetiko (Salono Schmidt)

ASci. Emmanuel COMPANYS prof. dr., Paris (F) & AProf. Osvaldo SANGIORGI dr. Sao Paulo (BR) & OProf. Klaus WELTNER dr., Frankfurt (D): Lingva informacio kaj perkomputila lingvoinstruado (K 05). 9-13 h, 15-19 h, sabaton.

ADoc. Dr. Reinhard FÖSSMEIER, München (D): Enkonduko al la problemoj de komputil-programara produktado (K 01). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

OProf. Miloš LÁNSKÝ dr., Paderborn (D) & PDoc. Dr. habil. Krystina KAUFFMANN, prof., Dieblich-Berg (D): Pormedicinaj spertulsistemoj (K 04). 9-13 h, 15-19 h, vendredon.

AProf. Carlo MINNAJA dr., Padova (I): Enkonduko en la matematikan lingvistikon (K 03). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

OProf. Vladimir MUŽIĆ, dr., Zagreb (YU): Valorado en la edukprocezo, sistemeca trarigardo kaj praktikaj problemoj (K 02). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

Kromaj kibernetikaj kursoj: V2 kaj V3 el la medioteko.

Sekcio 2: Humanistiko (Salono Komensky-Migliorini)

ADoc. Dr. Werner BORMANN, Hamburg (D): Inter senlaboreco kaj inflacio (H 03). 15-17 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

ADoc. Dr. Tazio CARLEVARO, Bellinzona (CH): Elektitaj ĉapitroj de kriminologia psikiatrio (H 01). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

ADoc. Mag. Heinrich DINGELDEIN, Marburg (D) & OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr., Torino (I): Fonologia lingvopriskribo. Konceptoj kaj alikado (H 04). 16 - 18 h, ĵaŭdon; 9-13 h, 15-17 h, vendredon.

OProf. Aleksandr DULIĈENKO, Tartu (SU): Interlingvistiko (H 05). 17-19 h, vendredon; 9-13 h, 15-17 h, sabaton.

PDoc. Richard SCHULZ, Minden (D): Vojaĝo kun la tempo. Sciencnivela uzo de la Internacia Lingvo (H 02). 11-13 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

Sekcio 3: Struktursciencoj (Salono Euklides)

OProf. Božidar POPOVIĆ dr., Beograd (YU): Kalkulado de planedetaj orbitroj (S 02). 11-13 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

OProf. Karl SCHICK dr., Aachen (D): La programlingvo Pascal. Enkonduko por komencantoj (S 03). 15-17 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

PDoc. Jozsef SZABO dr., Debrecen (H): Enkonduko en la stereografion (S 01). 9 - 11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

Sekcio 4: Filozofio (Salono Descartes)

ADoc. Helmut ANGSTL dr., München (D): Enkonduko en la logikon II (F 02). 15-17 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

OProf. Dr. habil. Helmar FRANK, Paderborn (D): Strukturo kaj regularoj de AIS (F 01). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

Sekcio 5: Natursciencoj (Salono Galilei)

OProf. Ralph A. LEWIN dr., La Jolla (USA): Elektitaj aspektoj de algoj (phycology = algologio) (N 03). 9-13 h, 15-19 h, vendredon.

AProf. Hans Michael MAITZEN dr., Wien (A): La astronomiaj superteleskopoj surteraj kaj spacaj kaj iliaj celobjektoj (N 01). 11-13 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

AProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr., München (D): Statistika metodaro (N 02). 15-17 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

Sekcio 6: Morfosciencoj (Salono Gandhi)

Asci. Mag. Norbert BRECHT, St. Augustin (D) & OProf. Dr. habil. Helmar FRANK Paderborn (D): Kial kiujn mankojn en aŭdvida instruadformigo kiel eviti? (Kritika pritrakto de la AIS-medioteko) (M 02). 11-13 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

ADoc. Mag. Antje ESKE prof. & OProf. Kurd ALSLEBEN dr. h.c., Hamburg (D): Morfosciencaj esprimformoj antaŭ komunikadmorala fono (M 03). 15-17 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

OProf. Oton PANCER dr., Zagreb (YU) & OProf. Kurd ALSLEBEN dr. h.c., Hamburg (D) & AProf. Hristo MARINOV dr., Sofia (BG) & ASci. Johann A. PACHTER, Sigmaringen (D): La homaro ekmarŝu al pli bona estonto laŭ principoj de ergonomiko per formado de pli sana medio en agrikulturo, hortikulturo, industrio kaj en ĉiuj aliaj agadsferoj (M 04). 9-13 h, 15-19 h, sabaton.

PDoc. Dr. habil. Tyburcjusz TYBLEWSKI, Jelenia Gora (PL): Internacia turismo (M 01). 9-11 h, lundon ĝis ĵaŭdo.

3. Docentiĝprelegoj, debutprelegoj, projektakceptigaj prelegoj kaj specialaj prelegoj de invititoj (kun sekvonta diskuto kaj paŭzo po 60 minutoj)

Sekcio 1: Kibernetiko (Salono Schmidt)

ASci. FENG Zhengyuan, Paderborn (D): Perkomputila legaĵorientita morfemlernado (K 12). 18-19 h, ĵaudon.

S-ro Vlastimil POLAK dr., Soest (D): Informaciteoriaj kaj sistemikaj aspektoj de instrustrategioj por kognitivaj instruaĵoj (K 11). 17-18 h, ĵaŭdon.

Sekcio 2: Humanistiko (Salono Komensky-Migliorini))

OProf. Aleksandr DULIĈENKO dr., Tartu (SU): Interlingvistikaj esploroj en Soveta Unio (H 11). 18-19 h, merkredon.

ASci. Elisabetta FORMAGGIO, Chiavari (I): Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado (H 11). 17-18 h, merkredon.

Sekcio 5: Natursciencoj (Salono Galilei)

S-ro Wlodzimierz A. BRZEZINSKI mag., Goynia (PL): Strukturo de nomo en biologiaj sciencoj - kompara analizo de latino, FAO- kaj AFS-Sistemoj (N 12). 18-19 h, merkredon.

OProf. Ralph A. LEWIN dr., La Jolla (USA): Algologio (N 11). 17-18 h, merkredon.

S-ro Remigiusz MIELCAREK prof., Montreal (CND): Aktualaj problemoj de la protektado de savanoj kaj pluvarbaroj en afriko (N 11). 17-18 h, mardon.

4. Liberaj prelegoj (Kun sekvonta diskuto kaj paŭzo: po 40 minutoj)

Sekcio 1 : Kibernetiko (Salono Schmidt)

AProf. Cezar APREOTESEI dr., Timisoara (R): Kibernetikaj elementoj en la „Psychologie consonantiste" (Lugoj - Paris, 1938/9) de St. Odobleja (K 24). 17-17.40 h, mardon.

S-ro FAN Baiquan, Shenyang (CHN): Sistem-dinamiko (K 22). 17.40-18.20 h, lundon.

S-ro Rolf HABERBECK M.A., Berlin (D): Integrational Grammars and Unificational Grammars (K 23). 18.20-19 h, lundon.

S-ro Rolf HABERBECK M.A., Berlin (D): Outline for a Concept of Quantum Linguistics (K 26). 18.20-19 h, mardon.

AProf. Carlo MINNAJA dr., Padova (I): Modelo de paralela traktado en la inversigo de plurlingvaj vortaroj (K 21). 17-17.40 h, lundon.

AProf. Osvaldo SANGIORGI dr., Sao Paulo (BR): Transinformo kaj Aplikado en Pedagogia Kibernetiko (K 25). 17.40-18.20 h, mardon.

Sekcio 2 : Humanistiko (Salono Komensky - Migliorini)

AProf. Cezar APREOTESEI dr., Timisoara (R): EMINESCU en Esperanto (okaze de la centjariĝo de la rumana genia poeto en la kalendaro de UNESKO) (H 23). 18.20-19.00 h, lundon.

ADoc. Dr. Werner BORMANN, Hamburg (D): Taskoj kaj laboroj de la Akademio de Esperanto de 1905 ĝis la nuntempo (H 25). 17.40-18.20 h, mardon.

ASci. Francis DESSART prof. dr., Namur (B): Le droit à la Communication, élément de la Pédagogie des Droits de l'Homme (H 24). 17.00-17.40 h, mardon.

PDoc. Richard SCHULZ, Minden (D): La sonoreco en poezio kiel tradukada problemo (H 26). 18.20-19.00 h, mardon.

S-ino Kristina SCUKANEC, Zagreb (YU): Tempo de Ĝojo - psikopedagogia terapio helpe de muziko, movo kaj parolo (H 21). 17.00-17.40 h, lundon.

S-ino Irena SZANSER mag., Warszawa (PL): Rolo de la kanzono dum instru- lernprocezoj - teorio kaj praktiko (H 22). 17.40-18.20 h, lundon.

Sekcio 3: Struktursciencoj (Salono Euklides)

ADoc. Stojĉo STOJĈEV dr., Sofia (BG): Algoritmo VSEPARN por determino de la generantoj orbitoj kaj ordo de la grupo de aŭtomorfismoj de grafo (S 22). 17.40-18.00 h, mardon.

PDoc. Jozsef SZABO dr., Debrecen (H): Novaĵoj en la komputila grafiko (S 21). 17.00-17.40 h, mardon.

Sekcio 4: Filozofio (Salono Descartes)

S-ro Albert MENNE prof. dr., Dortmund (D): Philosophische Aspekte der Zeit (F 21). 17.00-17.40 h, lundon.

ADoc. Romeo PAGLIARANI dott., Cesena (I): Historia skizo pri kristana filozofio (F 23). 18.20-19.00 h, lundon.

AProf. Werner STROMBACH dr., Dortmund (D): Grundprobleme der systematischen Philosophie (F 22). 17.40-18.20 h, lundon.

Sekcio 5: Natursciencoj (Salono Galilei)

S-ro Siegwart GÜNTHER prof. dr., Bad Urach (D): Das Albert-Schweitzer-Hospital in Lambarene - Erinnerungen und Ausblick. Dia-Vortrag (N 22). 17.00-17.40 h, ĵaŭdo.

ADoc. Miĥail T. POPOV dr., Berdjansk (SU): Antaŭvido kaj taĥionoj (N 21). 18.00-18.40 h, mardon.

ADoc. Miĥail T. POPOV dr., Berdjansk (SU): La formulo de nativa DNA kaj ĝia rubandforma modelo (N 24). 18.20-19.00 h, ĵaŭdon.

AProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr., München (D): Pri terminologiaj problemoj en la kampo de la aplikata statistiko kaj biometrio (N 23). 17.40-18.20 h, ĵaŭdon.

Sekcio 6: Morfosciencoj (Salono Gandhi)

ADoc. Mag. Antje ESKE prof., Hamburg (D): Infanoj kaj komputiloj (M 23). 17.40-18.20 h, ĵaŭdon.
AProf. Mario GREGO dr., Venezia (I): Turismo (M 22). 17.00-17.40 h, ĵaŭdon.
S-ro Cord PASSOW dr., Karlsruhe (D): Tempo (M 24). 18.20-19.00 h, ĵaŭdon.
S-ro YIN Guosheng, Shanghai (CHN): Kolora vortfarado (M 21). 17.00-17.40 h, merkredon.

5. Lingvokursoj

ADoc. Dr. Werner BORMANN, Hamburg (D): ILo por sciencistoj - kurso laŭ la rekta metodo por komencantoj kun bazaj konoj. Por interesitoj: daŭrigo laŭ privata interkonsento dum la semajno (L 1), salono Komensky, sabaton 08-26, 15-19 h, dimanĉon 08-26, 9-13 h.
ASci. Elisabetta FORMAGGIO, Chiavari (I): ILo por sciencistoj II - parolekzercado precipe por kandidatoj (L 2), salono Euklides, merkredon 15-19 h, ĵaŭdon 15-19 h.

6. Kromaj koncizprelegoj (po 20 minutoj inkluzive demandojn kaj paŭzeton)

Aliĝintaj SUSanoj rajtas - se sekcio ankoraŭ disponas pri tempo por tio - ankaŭ lastminute anonci prelegeton en ajna oficiala lingvo de AIS ĉe la koncernata (vic)dekano aŭ ties deĵoranta anstataŭanto (vd. afiŝon en la kongresejo), kunportante almenaŭ du afiŝeblajn foliojn DIN A 4 kun temo kaj sekcio; la tempo estos aldonata. La prelegdaŭro estu 10 - 15 minutojn, por ke restu iom da tempo por demadoj kaj por paŭzo ĝis la sekvonta programero. - La kunvenon gvidos (reprezentanto de) la dekano.

7. Kandidatprelegoj

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas per adapta adopto akiri de AIS la agnoskon de sia akademia nivelo (bakalaŭreco aŭ magistreco aŭ doktoreco aŭ habilit-doktoreco) okazos prefere la 1an kaj 2an de septembro. La kandidatoj informu la Senatan Sekretarion kaj direktoron de la ekzamenoficejo de AIS (OProf. Oton PANCER dr., Dom „Lavoslav Ŝvarc", Bukovaĉka Cesta 55, YU-41000 Zagreb, Tel. 003841-219922) kaj ankaŭ interkonsentu kun la ekzamenoficeja sekretariejo en San Marino (p.a. G. Sammaritani, Via Eulimella 7, 47031-RSM Galazzano/Serravalle Rep. di San Marino,

tel. 0039549-901009) nepre antaŭ la 10a de aŭgusto, se ili volas ŝanĝi la temon anoncitan sur la kandidatiĝfolio aŭ se ili volas retiriĝi. La kandidatprelegoj okazos publike. La interkonsentitaj horoj kaj temoj estos afiŝitaj aŭ troviĝos en la aktujo ricevebla ĉe la kongresa sekretariejo.
Skribaj ekzamenoj (inkluzive la kursfinaj ekzamenetoj) okazas ĵaŭdon vespere je la 21-a horo en salono Komensky.
Buŝaj fakekzamenoj nepublikaj okazos vendrede laŭ interkonsento kun la ekzamenistoj.

8. Kadra programo

La oficiala kultura programo okaze de la lastaj tagoj de la jaro 1688 post la fondo de la Respubliko de San Marino estos afiŝita en San Marino. SUS-anoj plej verŝajne povas - kiel ĉiujare - ricevi specialan inviton.

La inaŭguro de la ekspozicio de la Teknika kaj Arta Sektoroj okazos en la ekspoziciejo lundon la 28-an de aŭgusto je la 20.30 h, kantos Nicoline, kaj Rikardo Ŝulco prezentos tekste kaj lumbilde la ekspresionisman infanlibron „La Magia Ŝipo" den Ĵano Lajpo (Hans Leip).

„Abismo" estas la titolo de sonetaro kiun prezentos Rikardo Ŝulco, kun litografioj de Ĵano Lajpo, ĵaŭdon ekde la 21-a horo.

„Muziko internacia - kantas kaj ludas Nicoline el Namur (B)",, mardon je la 21-a horo.

La kursfinaj ekzamenetoj kaj la skribaj ekzamenoj okazos ankaŭ ĵaŭdon ekde la 21-a h. Eventuala ripeto dimanĉon matene 9-a horo.

Vendredon ekde la 19.30-a h la Eŭropa Klubo havos sian jarĉefkunvenon en La Grotta.

Vendredon ekde la 21-a horo S-ino E. Bormann montros diapozitivojn pri Brazilo en la muzikinstituto.

Ĉiuj aranĝoj okazos en la muzikinstituto, se ne estos anoncita alia loko.

9. Medioteko de AIS

Prezentado de la ĝisnunaj videokursoj de AIS el la medioteko de AIS:

V 1: ILo por sciencistoj, lundon ĝis ĵaŭdon 9-11 h.
V 2: Elementoj de la Prospektiva Klerigscienco, lundon ĝis ĵaŭdo 11-13 h (Sekcio 1).
V 3: Bazaj laŭkvantaj metodoj de la klerig- kaj lingvokibernetiko, lundon ĝis ĵaŭdo 15-19 h (Sekcio 1) 2 studunuoj.
V 4: Strukturo kaj regularoj de AIS, sabaton 9-13 h, 15-19 h.

Akiro de studunuoj nur eblas surbaze de fina ekzameno trapasita kun noto ne sub la nivelo 7/10. Senekzamena partopreno senpage eblas.

Kursoj kaj kursfinaj ekzamenoj

La fakajn kursojn kaj prelegseriojn (po 8 studhorojn) gvidos efektivaj membroj de AIS eventuale kunlabore kun AdAIS; lingvokursojn (ILo, programiglingvoj) realigas efektivaj aŭ adjunktaj AISanoj. Enskribiĝintoj rajtas postuli oficialan ĉeestateston se ili ĉeestis minimume 3/4n (eventuale jam anticipe, se la sama kurso ankaŭ jam anticipe okazis) kaj partopreni la kursfinan ekzameneton (ambaŭ senpage). Tiu ĉi povas esti skribforma laŭ la metodo de selektrespondoj aŭ eventuale de liberaj respondoj, se la respondo nur konsistas el nomoj aŭ nombroj, tiel ke la kompreno de ILo sufiĉas kaj propra esprimkapablo en ILo ne necesas.

Ankaŭ pri la aŭdvidaj kursoj ofertitaj el la medioteko okazos ekzamenetoj por kandidatoj, kiuj aŭ estis luprenintaj aŭ aĉetintaj la kurson, aŭ ĝin enskribiĝinte plejgrandparte sekvis dum SUS mem; ambaŭkaze atesto nur validas kiel pruvilo de akirita studunuo, se la noto estas minimume 7/10.

Necesas, ke la kandidato antaŭ ol finekzameniĝi estos enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS, inter kiuj minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu li kandidatiĝas; minimume unu devas esti el alia sekcio; maksimume unu de la tri devigaj kursoj povas esti ILo-kurso. En minimume unu kurso la kandidato devas partopreni la ekzameneton ricevante minimume la noton 6/10, aŭ 7/10 se temas pri kurso el la medioteko. Ripeto de la ekzameneto eblas. Ne estas akcepteble por la fina ekzameno kandidato, kiu neniun SUS-kurson plejgrandparte sekvis kaj per ekzameneto sukcese finis dum SUS mem.

Prelegoj

En ĉiu sekcio la plejmulto de la prelegoj estu en ILo. La partopreno je unuopaj prelegoj (kontraŭe al la partopreno en prelegserioj!) por kandidatoj ne egalvaloras al kurspartopreno. - La prelegkunsidojn gvidu la dekanoj (aŭ vicdekanoj) de la koncerna sekcio aŭ ŝarĝitoj de ili.

Okazos - ĉiuj en ILo - debutprelegoj de novaj profesoroj kaj docentiĝprelegoj de estontaj plenrajtaj docentoj de AIS. Ili ne daŭru pli longe ol po 45 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 60) minutojn. La egala tempo estas je dispono por invititaj prelegoj en ajna oficiala lingvo de AIS kaj por projektakceptigaj prelegoj (en ILo) de kandidatoj, kiuj celas estontan akiron (ne: adopton) de titolo ĉe AIS. - En la programskemo tiuj kvar tipoj de prelegoj estas egale indikitaj per la cifero „1" post la litero de la koncerna sekcio. Liberaj prelegoj en ajna oficiala lingvo de AIS ne daŭru pli longe ol po 25 (inkluzive diskuton kaj paŭzeton: 40) minutojn. Ili estas indikitaj per la cifero „2" post la litero de la koncerna sekcio. Ankaŭ de liberaj ISKanoj, t.e. de ISKanoj, kiuj ankoraŭ ne apartenas kiel adjunktoj aŭ efektivaj membroj al AIS, libera prelego estas akceptebla fare de la dekano de la koncerna sekcio.

Okazos kromaj koncizprelegoj po 10 - 15 (inkluzive demandojn kaj paŭzeton: 20) minutaj en ajna oficiala lingvo de AIS. Ili ankoraŭ post la limdato por la starigo de la SUS-programo - eĉ lastminute surloke - estas oferteblaj al la (vic)dekano aŭ (vic)fakarestro de la koncerna sekcio. Ĉiuj temoj de tiuj kromaj (t.e. en la programkajero ne surlistigitaj) koncizprelegoj estos bontempe afiŝataj dum SUS laŭ la indikoj de la

prelegontoj. En la programskemo * indikas tempointervalojn rezervitajn por koncizprelegoj.

AIS ankoraŭ ne havas la eblon realigi publikaĵon kun la SUS-prelegoj, sed rekomendas publikigi la tekstojn en taŭga scienca revuo kun la mencio de SUS.

Tiuj prelegantoj, kiuj deziras publikigi sian prelegon en ILo (ekzemple por plenumi alvoko-kondiĉon), povas sendi la manuskripton al unu el la jam tradiciaj sciencaj revuoj plene aŭ parte internacilingvaj - aŭ al la redakcio de la nova internacilingva scienca revuo FOKUSO (respondeca redaktoro: ADoc. BROCZKO Peter, dr.inĝ., kunredaktoroj: ADoc. KOUTNY Ilona kaj LUKACS Andras): p.a. Komputista Grupo de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest.

Terminologia laboro de la fakaroj kaj sekcioj de AIS

De pluraj flankoj venis instigoj je partopreno en la internacia terminologia laboro. Realisma estas la propono krei kreskantajn elektronikajn vortarojn

1) de la nomoj de la diversaj branĉoj de la scienco (fakoj, subfakoj, specialkampoj) tiel kiel ili aperas en la Internacia Sciencista Dokumentaro (ISD) de AIS
2) pri la fakterminoj de la diversaj fakoj flegataj en la fakaroj de AIS.

Laŭ la modelo de la „EK-vortaro de matematikaj terminoj" de Hilgers/Yashovardhan la vortaroj enhavu la fakterminojn almenaŭ en la kvin oficialaj lingvoj de AIS kune kun la difino en ILo. Havebla estu surdisketigo ĉiam de la plej aktuala stato. De tempo al ̦mpo aperu elspresigo libroforme.

Por la programo de la sekcioj kaj la organizo de iliaj kunsidoj respondecas iliaj dekanoj.
La adresoj de la dekanoj estas:

Sekcio 1 (Kibernetiko): OProf. V. Mužić dr., Pedagogija - Filozof.fakult., Savska 77 - P.F. 167 YU - 41000 Zagreb
Sekcio 2 (Humanistiko): OProf. F. Pennacchietti dr., Via delle Rosine 10, I - 10123 Torino
Sekcio 3 (Struktursciencoj): OProf. B. Popovič dr., Ognjena Price 80, YU - 11000 Beograd
Sekcio 4 (Filozofio): Provizora dekano: AProf. Werner Strombach dr., Hessenbank 16, D - 4600 Dortmund 50. Anstataŭanto: ADoc. H. Angstl dr., Betschartstr. 14, D - 8000 München 60.
Sekcio 5 (Natursciencoj): OProf. Sin'itirô Kawamura dr., Miyawakityô, 2-4-19, J-7760 Takamatu.
Sekcio 6 (Morfosciencoj): OProf. Kurd Alsleben dr. h.c., Paulinenallee 58, D - 2000 Hamburg 50

Aliĝo

La aliĝo rajtigas

(1) ricevi la programkajeron kaj je la fino de SUS la partoprenantarliston
(2) senpage partopreni ĉiujn kursojn, prelegojn kaj oficialaĵojn (nur necesas enskribiĝi al kursoj aŭ prelegserioj, se oni celas ĉeestadateston aŭ ekzamenparteoprenon pri ĝi),

(3) senpage partopreni ĉiujn erojn de la kadra programo (aparte riĉa pro la festaj okazintaĵoj de la Respubliko dum la SUS - semajno), pri kiuj la programo ne indikas pagendan kromkotizon per * asterisko.

Oni prefere pagu la kotizon antaŭ la 31-a de julio: ĉu DM 30,-- ĉu LIT 22.500 al AIS-Konto 2051-305 Postĉek-oficejo Hannover, BLZ 250 100 30, aŭ ĉeke al la prezidanta Sekretariejo de AIS (Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn) nepre kun indiko: „Aliĝo SUS 6 de .... ", aldonante la enalfabetigan NOMON majuskle.
Kiu post la 31-a de julio aŭ maljam dum SUS mem aliĝos pagu 37.500 LIT aŭ 50,-- DM surloke kaj ricevos sian programkajeron ne plu perpoŝte sed ĉe la akceptejo en San Marino.

Vizo

Partoprenontoj, kiuj ne venas el EK-landaj, informiĝu, ĉu ili bezonas italan vizon kaj eventuale transitvizon tra aliaj landoj kaj petu tion bontempe (en kelkaj kazoj la itala vizo bezonas dumonatan pritraktadon!). Partoprenontoj, kiuj bezonas (por la forestpermeso, por akiro de vojaĝsubvencio aŭ alicele) oficialan inviton el San Marino mem en speciala formo (certigo pri akcepto de prelego, pri kovriteco de la restadkostoj ktp.) informu pri tio kun la aserto, ke temas pri necesa formalaĵo, ne pri sindevigo de AIS. Tamen, AIS klopodas ekster la kunmetita programkadro laŭ bezone enplanigi tempointervalon por kromaj koncizprelegoj kaj havigi adresojn de subtenaj organizoj, kiuj eventuale helpas per stipendio. AIS mem havas nek la financajn rimedojn nek la laborforton por fari pli ol tio cele la solvon de individuaj partoprenproblemoj.

Mono

Cele plisimpligon kadre de AIS prezindikoj prefere okazas en „Akademiaj Kotiz-Unuoj" (AKU); unu AKU estas la laŭeble stabila jarkotizo de la Subtena Sektoro, t.e. momente 100,- DM aŭ 75.000 LIT. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK) de AIS havas konforme al la regularo pri kotizoj kaj mastrumado „servobonhavon", t.e. AIS-konton, de kiu eblas (1) senkoste ĝiri al aliaj individuaj AIS-kontoj aŭ pagi al AIS, (2) je 3%a kosto depreni dum SUS monon en DM aŭ LIT kaj (3) ĝiri al bank- aŭ poŝtĉekkontoj je 5%a kosto (aŭ senkoste, se temas pri pagendaj fakturoj por varoj aŭ servoj necesaj por agadi favore al celoj de AIS).

Honorarioj aŭtomate estas alkalkulataj al la servobonhavoj, pagendaj membrokotizoj aŭtomate dekalkulataj.

Restadkostoj dum SUS estas surbaze de fakturoj senkoste pageblaj el la servobonhavo de la partoprenanto, kiu zorgu bontempe pri sufiĉa kontostato.

Ne eblas ŝanĝi ĉe la kongresoficejo de SUS monon inter la diversaj monsistemoj!

Loĝado:

En la ĉirkaŭaĵo de la muzikinstituto estas nur kelkaj hoteloj.
Kat. 2: Hostaria „Da Lino" Piazza grande 48, Borgo Maggiore, tel.: 0549/991575-902300
Kat.3: Motel Crocenzi, Via Ventotto Luglio, Borgo Maggiore, tel.: 0549/902507
La Fonte, Via Brandolina, 69 Borgo Maggiore, tel.: 0549/903402

La prezoj estas:

Kategorio	2*	3
unulita ĉambro kun banĉ.	36.000 LIT.	28.500
sen banĉ.		23.500
dulita ĉambro kun banĉ.	51.000	45.500
sen banĉ.		36.000
trilita ĉambro kun banĉ.	62.500	54.500
sen banĉ.		44.500

* en Hostaria Da Lino estas nur ĉambroj kun banĉambro haveblaj

Se vi venas aŭtomobile bv. prefere prenu Hotel Rossi (cat. 2, Via Venticinque Marzo, 13, tel. 0549/902263-902506), aŭ Motel Crocenzi, ĉar tie estas pli da parklokoj ol en la Centro de Borgo Maggiore.
Alia eblo estas ankaŭ veni kun tendo aŭ loĝĉareto, ekzistas en San Marino Kampadejo: Camping della Murata, Via del Serrone 65, Murata, 47031 Republika de San Marino, tel.: 0549/991299. Oni pagas tage por persone 3.000 LIT. La tendo kostas tage 2.000 LIT, la aŭto ankaŭ 2.000 LIT, la loĝĉareto 5.000 LIT.
Personoj kiuj venas aŭte aŭ preferas loĝi tre malmulte-koste povas ankaŭ loĝi en la junulargastejo de Rimini, kiu troviĝas en Miramare, parto de Rimini. La adreso estas: Via Flaminia 300, Miramare, I-47037 Rimini/Forli, tel.: 0541/373216. Tie la tranokto kun matenmanĝo kostas 7.500 LIT. Oni atingas tie elektran aŭtobuson al la stacidomo, kaj de tie la aŭtobuson al San Marino.
Estas oportune sin anonci en la junulargastejo iom pli frue, ĉar eble ĝi estas okupata dum tiu tempo.
Ankaŭ en la kampadejo estus bone antaŭe anonci sin, sed ne tiom urĝe.

Kiu preferas loĝi en la Centro Historia (San Marino Città) havas elekton inter pluraj hoteloj (La Grotta, Grand Hotel, Titano, Bolognese, Cesare, Panoramic, Antica, Tre Penne k.a.) kaj povas atingi la kongresejon per la dratŝnuregveturilo. Prefere rezervigu pere de Bac.sc.hum.h.c. Miriam MICHELOTTI SMdAIS, La Grotta, Tel. 0039549-991214.

Invito al la Asembleo de la Subtena Sektoro

Plenumante la artikolon 16 de la Statuto, la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 9.3 (Organizaj reguloj por SUS) de la provizora Regularo pri la instruado kaj studado ĉe AIS mi kunvokas la Asembleon de la Subtena Sektoro de AIS al ties 6-a kunsido, kiu okazos en la Istituto Musicale Sammarinese, Via O. Scarito 33, Borgo Maggiore (RSM) dimanĉon, la 27-an de aŭgusto 1989, 17 - 19 h.

Tagordo:

1. *Malfermaj konstatoj (ĉeestanteco, kvorumeco)*
2. *Decidoj pri formalaĵoj (laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto)*
3. *Ĝenerala raporto*
4. *Financa raporto, senŝarĝigo, AKU-kurzo*
5. *Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn anticipe*
6. *Kromaj tagordaj punktoj eventuale anticipe anoncitaj per invitletero aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 2*
7. *Eventuale necesaj elektoj (nur en la - ne probabla - kazo de retiriĝoj)*
8. *Diversaĵoj.*

Paderborn, 1989-06-14/1688pfR
La Direktoro: ADoc.Dr. L. Weeser-Krell

Invito al la Ĝenerala Asembleo

Plenumante la artikolon 8 de la Statuto, la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 9.4 (Organizaj reguloj por SUS) de la provizora Regularo pri la instruado kaj studado ĉe AIS mi kunvokas la Ĝeneralan Asembleon de la Scienca Sektoro de AIS al ties 8-a kunsido, kiu okazos en la Istituto Musicale Sammarinese, Via O. Scarito 33, Borgo Maggiore (RSM) dimanĉon, la 3-an de septembro 1989, 17 - 19 h.

Tagordo:

1. *Malfermaj konstatoj (ĉeestanteco kvorumeco)*
2. *Decido pri formalaĵoj (protokolo, tagordo, ĉeestrajto)*
3. *Ĝenerala raporto de la Senato*
4. *Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto*
5. *Decidoj pri proponoj de la Senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn anticipe kaj legeblaj en la SUS-akceptejo almenaŭ 24 horojn anticipe*
6. *Kromaj tagordaj punktoj eventuale anticipe anoncitaj okaze de skriba kunvoko aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1*
7. *Eventuale necesaj elektoj (Pro malsano OProf. Kawamura ankoraŭ ne akceptis sian elektitecon en la Senaton)*
8. *Diversaĵoj.*

Paderborn, 1989-06-14/1688pfR
La prezidanto: OProf.Dr.habil. H. Frank

Studadsesio en Ĉinio 1989-09-20/26 ankoraŭ ne konfirmita de Academia Sinica

Surbaze de la provizora invito dissendita kaj publikigita de la internacilingva sekcio de la ĉina akademio de sciencoj (Academia Sinica) fare de sekciestro SHEN Chenru aliĝis jam dekoj da sciencistoj ankaŭ el ekster ĉinio al la proponita unua komuna studadsesio de AIS kaj Academia Sinica planita por 1989-09-20/26 en Beijing. Pli ol dek profesoroj kaj docentoj de AIS el eŭropo, azio kaj ameriko ofertis por la starigota programo kursojn kaj unuopajn prelegojn.

Laŭ decido de la Senato (vd. protokolon de la 11-a kunsido, tagorda punkto 3, en n-ro 1/30, 1989 de la revuo grkg/Humankybernetik) la estraro de Academia Sinica ricevis de AIS pere de senatano OProf.CHEN Yuan leteron kun la peto konfirmi la oficialecon de la komuna sesio (kaj de la kadre de ĝi antaŭvidita interkonsiliĝo pri la komuna realigo de internacilingva universitateca klerigejo) ankaŭ flanke de Academia Sinica. Krome la klerigsciencaj universitatoj en Ŝanghaj kaj Guangzhou ricevis pere de la tieaj AISanoj leterojn kun la demando, ĉu tie eventuale estus interese realigi parton aŭ daŭrigon de la sesio. Al ĉi tiu demando respondis nee la profesoroj WAN Jiarou el Ŝanghaj kaj LI Kedong el Guangzhou. Sed ne alvenis ĝis nun la necesa konfirmo de Academia Sinica pri la oficiala okazigo de la sesio planita en Beijing. OProf. CHEN Yuan sendis teleleteron el Beijing al la prezidanta sekretariejo de AIS, sciigante, ke ankaŭ al li ĝis nun ne venis konfirmo aŭ peto pri koncerna interparolado.

Estas konsilinde, ke interesitoj antaŭ definitiva vojaĝpreparo kontaktiĝu kun la prezidanta sekretariejo de AIS. Plej malfrue en la julio certos, ĉu la sesio okazos aŭ estos prokrastata al venonta jaro.

Richtlinien für die Manuskriptabfassung

Artikel von mehr als 12 Druckseiten Umfang (ca. 36.000 Anschläge) können in der Regel nicht angenommen werden; bevorzugt werden Beiträge von maximal 8 Druckseiten Länge. Außer deutschsprachigen Texten erscheinen ab 1982 regelmäßig auch Artikel in den drei Kongreßsprachen der Association Internationale de Cybernétique, also in Englisch, Französisch und Internacia Lingvo. Die verwendete Literatur ist, nach Autorennamen alphabetisch geordnet, in einem Schrifttumsverzeichnis am Schluß des Beitrags zusammenzustellen - verschiedene Werke desselben Autors chronologisch geordnet, bei Arbeiten aus demselben Jahr nach Zufügung von „a", „b" usf.. Die Vornamen der Autoren sind mindestens abgekürzt zu nennen. Bei selbständigen Veröffentlichungen sind anschließend nacheinander Titel (evt. mit zugefügter Übersetzung, falls er nicht in einer der Sprachen dieser Zeitschrift steht), Erscheinungsort und -jahr, womöglich auch Verlag, anzugeben. Zeitschriftenbeiträge werden nach dem Titel vermerkt durch Name der Zeitschrift, Band, Seiten und Jahr. - Im Text selbst soll grundsätzlich durch Nennung des Autorennamens und des Erscheinungsjahrs (evt. mit dem Zusatz „a" etc.) zitiert werden. - Bilder (die möglichst als Druckvorlagen beizufügen sind) einschl. Tabellen sind als „Bild 1" usf. zu numerieren und nur so zu erwähnen, nicht durch Wendungen wie „vgl. folgendes (nebenstehendes) Bild". - Bei Formeln sind die Variablen und die richtige Stellung kleiner Zusatzzeichen (z.B. Indices) zu kennzeichnen.
Ein Knapptext (500 - 1.500 Anschläge einschl. Titelübersetzung) ist in mindestens einer der drei anderen Sprachen der GrKG/Humankybernetik beizufügen.
Im Interesse erträglicher Redaktions- und Produktionskosten bei Wahrung einer guten typographischen und stilistischen Qualität ist von Fußnoten, unnötigen Wiederholungen von Variablensymbolen und übermäßig vielen oder typographisch unnötig komplizierten Formeln (soweit sie nicht als druckfertige Bilder geliefert werden) abzusehen, und die englische oder französische Sprache für Originalarbeiten in der Regel nur von „native speakers" dieser Sprachen zu benutzen.

Direktivoj por la pretigo de manuskriptoj

Artikoloj, kies amplekso superas 12 prespaĝojn (ĉ. 36.000 tajpsignojn) normale ne estas akceptataj; preferataj estas artikoloj maksimume 8 prespaĝojn ampleksaj. Krom germanlingvaj tekstoj aperadas de 1982 ankaŭ artikoloj en la tri kongreslingvoj de l'Association Internationale de Cybernétique, t.e. en la angla, franca kaj Internacia lingvoj.
La uzita literaturo estu surlistigita je la fino de la teksto laŭ aŭtornomoj ordigita alfabete; plurajn publikaĵojn de la sama aŭtoro bv. surlistigi en kronologia ordo, en kazo de samjareco aldoninte „a", „b" ktp.. La nompartoj ne ĉefaj estu almenaŭ mallongigite aldonitaj. De disaj publikaĵoj estu - poste - indikitaj laŭvice la titolo (evt. kun traduko, se ĝi ne estas en unu el la lingvoj de ĉi tiu revuo), la loko kaj jaro de la apero, kaj laŭeble la eldonejo. Artikoloj en revuoj ktp. estu registritaj post la titolo per la nomo de la revuo, volumo, paĝoj kaj jaro. - En la teksto mem bv. citi pere de la aŭtornomo kaj la aperjaro (evt. aldoninte „a" ktp.). - Bildojn (laŭeble presprete aldonendajn!) inkl. tabelojn bv. numeri per „bildo 1" ktp. kaj mencii ilin nur tiel, neniam per teksteroj kiel „vd. la jenan (apudan) bildon". - En formuloj bv. indiki la variablojn kaj la ĝustan pozicion de etliteraj aldonsignoj (ekz. indicoj).
Bv. aldoni resumon (500 -1.500 tajpsignojn inkluzive tradukon de la titolo) en unu el la tri aliaj lingvoj de GrKG/Humankybernetik.
Por ke la kostoj de la redaktado kaj produktado restu raciaj kaj tamen la revuo grafike kaj stile bonkvalita, piednotoj, nenecesaj ripetoj de simboloj por variabloj kaj tro abundaj, tipografie nenecese komplikaj formuloj (se ne temas pri prespretaj bildoj) estas evitendaj, kaj artikoloj en la angla aŭ franca lingvoj normale verkendaj de denaskaj parolantoj de tiuj ĉi lingvoj.

Regulations concerning the preparation of manuscripts

Articles occupying more than 12 printed pages (ca. 36,000 type-strokes) will not normally be accepted; a maximum of 8 printed pages is preferable. From 1982 onwards articles in the three working-languages of the Association Internationale de Cybernétique, namely English, French and Internacia Lingvo will appear in addition to those in German. Literature quoted should be listed at the end of the article in alphabetical order of authors' names. Various works by the same author should appear in chronological order of publication. Several items appearing in the same year should be differentiated by the addition of the letters "a", "b", etc. Given names of authors, (abbreviated if necessary, should be indicated. Works by a single author should be named along with place and year of publication and publisher if known. If articles appearing in journals are quoted, the name, volume, year and page-number should be indicated. Titles in languages other than those of this journal should be accompanied by a translation into one of these if possible. - Quotations within articles must name the author and the year of publication (with an additional letter of the alphabet if necessary). - Illustrations (fit for printing if possible) should be numbered "figure 1", "figure 2", etc. They should be referred to as such in the text and not as, say, "the following figure". - Any variables or indices occuring in mathematical formulae should be properly indicated as such.
A resumee (500 - 1,500 type-strokes including translation of title) in at least one of the other languages of publication should also be submitted.
To keep editing and printing costs at a tolerable level while maintaining a suitable typographic quality, we request you to avoid footnotes, unnecessary repetition of variable-symbols or typographically complicated formulae (these may of course be submitted in a state suitable for printing). Non-native-speakers of English or French should, as far as possible, avoid submitting contributions in these two languages.

Forme des manuscrits

D'une manière générale, les manuscrits comportant plus de 12 pages imprimées (env. 36.000 frappes) ne peuvent être acceptés; la préférence va aux articles d'un maximum de 8 pages imprimées. En dehors de textes en langue allemande, des articles seront publiés régulièrement à partir de 1982, dans les trois langues de congrès de l'Association Internationale de Cybernétique, donc en anglais, français et Internacia Lingvo.
Les références litteraires doivent faire l'objet d'une bibliographie alphabétique en fin d'article. Plusieurs œuvres d'un même auteur peuvent être énumérées par ordre chronologique. Pour les ouvrages d'une même année, mentionnez "a", "b" etc. Les prénoms des auteurs sont à indiquer, au moins abrégés. En cas de publications indépendantes indiquez successivement le titre (eventuellement avec traduction au cas où il ne serait pas dans l'une des langues de cette revue), lieu et année de parution, si possible éditeur. En cas d'articles publiés dans une revue, mentionnez après le titre le nom de la revue, le volume/tome, pages et année. – Dans le texte lui-même, le nom de l'auteur et l'année de publication sont à citer par principe (eventuellement complétez par "a" etc.). – Les illustrations (si possible prêtes à l'impression) et tables doivent être numérotées selon "fig. 1" etc. et mentionées seulement sous cette forme (et non par "fig. suivante ou ci-contre").
En cas de formules, désignez les variables et la position adéquate par des petits signes supplémentaires (p. ex. indices).
Un résumé (500–1.500 frappes y compris traduction du titre est à joindre rédigé dans au moins une des trois autres langues de la grkg/Humankybernetik.
En vue de maintenir les frais de rédaction et de production dans une limite acceptable, tout en garantissant la qualité de typographie et de style, nous vous prions de vous abstenir de bas de pages, de répétitions inutiles de symboles de variables et de tout surcroît de formules compliquées (tant qu'il ne s'agit pas de figures prêtes à l'impression) et pour les ouvrages originaux en langue anglaise ou en langue française, recourir seulement au concours de natifs du pays.